**Regularo de Internacia Junulara Festivalo (IJF)**

1. IJF estas aranĝo malfermita al ĉiuj, sendepende de nacio, religio, aĝo, genro, seksorientiĝo kaj handikapoj. Dum la renkontiĝo estos tolerataj nek molestado nek ĝenado, en kiu ajn formo (ekzemple pere de ofendaj komentoj aŭ ŝercoj, intenca timigado, postkurado, malkonvena fizika kontakto). Se vi spertas ion tian, ni petas vin raporti tion al la organizantoj kaj, se vi atestas ion tian, tuj interveni por ĉesiĝi ĝin.
2. La organizantoj ne responsas pri damaĝoj kontraŭ sano aŭ posedaĵoj de partoprenantoj, kiuj okazas dum la aranĝo.
3. IJF estas konceptita por la junularo kaj havas riĉan noktan programon. Aliĝante al la aranĝo vi akceptas, ke dum la nokto povas ne esti perfekta silento.
4. Organizantoj petas respekti la festivalejon, zorgi pri ĝia pureco, forlasi ĝin en la sama stato en kiu ĝi estis dum via alveno.
5. Ene de la festivalejo hejmbestoj estas malpermesataj.
6. Ene de la festivalejo oni ne rajtas fumi.
7. La litoj uzendas per littolaĵoj kaj littukoj. Vi povas aŭ kunporti proprajn aŭ uzi la surlokajn laŭ la kondiĉoj kontraktitaj kun la gastiga entrepreno. Uzi dormosakon sur la lito estas malpermesate.
8. La kostoj de damaĝoj al la festivalejo, kaŭzitaj de partoprenanto, estos kovritaj de la partoprenanto mem, kiu kaŭzis la damaĝon.
9. Aliĝante al la aranĝo, vi akceptas aperi en fotoj kaj videoj, kiuj poste publikigeblos, krom se vi eksplice indikas vian malkonsenton.
10. Via aliĝo ekvalidas la tagon de alveno de via antaŭpago (minimume 40€). Okaze de dubaj situacioj (ekz. pago sendita unu tagon antaŭ la limdato de aliĝperiodo), bonvolu pruvi la ĝustatempan alsendon per koncerna kvitanco.
11. Sendante vian aliĝon, vi akceptas la prezojn kiel indikitajn en la retejo de la evento.
12. Se vi ne plu povos partopreni la eventon, vi rajtas peti repagon nur de la antaŭpago, minus eventualaj ĝirimpostoj.
13. Vi rajtas transdoni vian antaŭpagon al iu alia partoprenonto: tiam estas via respondeco komuniki tion al ni. Bonvolu konsideri, ke transdoneblas nur la pagita sumo, ne tuta aliĝo.
14. Estas konsiderate afable paroli esperanton dum la aranĝo, sed ne regas strikta lingva disciplino kaj vi rajtas uzi ajnan lingvon laŭ via plaĉo. Ne estas permesate riproĉi homojn kiuj ne (bone) parolas esperanton.

**Okaze de klara miskonduko aŭ malrespekto al la regularo, la organizantoj rajtas forpeli partoprenanton de la evento.**

*laste modifita: 07/08/2026*

**Regolamento del Festival Giovanile Internazionale di Esperanto (IJF)**

1. L’IJF è un evento aperto a tutti, indipendentemente dalla nazionalità, dalla religione, dall’età, dal genere, dall’orientamento sessuale e dalle disabilità. Durante l’incontro non saranno tollerate molestie né forme di disturbo, in qualsiasi modo si manifestino, per esempio attraverso commenti o scherzi offensivi, intimidazioni intenzionali, pedinamenti o contatti fisici inappropriati. Se subisci un comportamento di questo tipo, ti chiediamo di segnalarlo agli organizzatori; se ne sei testimone, intervieni immediatamente per farlo cessare.
2. Gli organizzatori non sono responsabili dei danni alla salute o ai beni dei partecipanti che si verifichino durante l’evento.
3. L’IJF è pensato per i giovani e prevede un ricco programma serale e notturno. Iscrivendoti all’evento accetti che durante la notte potrebbe non esserci un silenzio perfetto.
4. Gli organizzatori chiedono di rispettare il luogo del festival, di averne cura e di lasciarlo nelle stesse condizioni in cui si trovava al vostro arrivo.
5. All’interno del luogo del festival gli animali domestici non sono ammessi.
6. All’interno del luogo del festival è vietato fumare.
7. I letti devono essere utilizzati con federe e lenzuola. È possibile portare la propria biancheria oppure utilizzare quella disponibile sul posto, secondo le condizioni concordate con la struttura ospitante. È vietato utilizzare il sacco a pelo sul letto.
8. I costi dei danni arrecati al luogo del festival da un partecipante saranno a carico del partecipante che li ha causati.
9. Iscrivendoti all’evento, accetti di poter comparire in fotografie e video che potranno essere pubblicati successivamente, salvo che tu esprima esplicitamente il tuo dissenso tramite il modulo d’iscrizione.
10. La tua iscrizione diventa effettiva il giorno in cui viene ricevuto il tuo acconto, per un importo minimo di 40 euro. In caso di situazioni dubbie – per esempio, un pagamento inviato il giorno prima della scadenza del periodo d’iscrizione – ti chiediamo di dimostrare l’invio tempestivo tramite la relativa ricevuta.
11. Inviando la tua iscrizione, accetti i prezzi indicati sul sito dell’evento.
12. Se non potrai più partecipare all’evento, hai diritto a richiedere il rimborso dell’acconto, detratte le eventuali spese di trasferimento.
13. Hai il diritto di trasferire il tuo acconto a un altro partecipante; in tal caso è tua responsabilità comunicarlo agli organizzatori. Tieni presente che può essere trasferita soltanto la somma effettivamente pagata, non l’iscrizione completa.
14. Durante l’evento è considerato cortese parlare in esperanto, ma non vige una rigida disciplina linguistica e hai il diritto di utilizzare qualsiasi

lingua di tua scelta. Non è consentito rimproverare le persone che non parlano esperanto, o che non lo parlano bene.

**In caso di comportamento gravemente scorretto o di mancato rispetto del regolamento, gli organizzatori hanno il diritto di allontanare un partecipante dall'evento.**

*Ultima modifica: 07/08/2026*